# *Preska? kvaronmiliono da kubanoj estas imunizitaj per almena? unu dozo de Abdala kaj Soberana 02*



**Eulogio Pimentel, vicprezidanto de BioCubaFarma**

Havano, jun 25 (RHK) La vicprezidanto de la entreprena grupo BioCubaFarma, Eulogio Pimentel Vázquez, esprimis ke 24% de la kuba lo?antaro jam estas imunizita per almena? unu dozo de la kubaj vakcinoj, post kiam en majo komenci?is la sanitara interveno.

Li aldonis ke Kubo estas la unua en la listo de landoj je monda nivelo, kiu havas pli grandan elcenton da homoj vakcinitaj por ?iu cento da enlo?antoj, kio spegulas la sinergion ekzistantan inter la industrio farmacia kaj la sansistemo.

La fakulo sciigis ke la evoluigo de vakcinaj kandidatoj enlande, du el ili kun efikeco-rezultoj superaj al tiuj rekomenditaj de la Monda Organizo pri Sano, estas rezulto de la pli ol 30-jara sperto en la evoluigo kaj produktado de vakcinoj.

La vicprezidanto de BioCubafarma komentis ke la bioteknologia industrio fabrikas la imunogenojn la? la niveloj de bonaj praktiko de fabrikado je internaciskale kaj nuntempe okazas inspektado de la reguliga institucio, la Centro por kontrolo ?tata de medikamentoj, ekipa?oj kaj medicinaj aparatoj, en la produktivaj centroj, kio garantias sekurecon kaj kvaliton por uzo en la lo?antaro.

Pri la sekvoj de la usona blokado en la farmacia industrio, li aldonis ke ?i komplikigas la akiron de rimedoj por evoluigi la medikamentoj, tial ke ?iu transakcio estas defio, altigas la kostojn kaj longigas la provizajn ciklojn dum monatoj.

La ministerio pri publika sano informis ke je la fermo de la 21-a de junio, jam estas injektitaj enlande 5 milionoj 113 926 dozoj kiel parto de la evolustrategio de tiuj ?i bioproduktoj.

?is tiu sama dato, 2 milionoj 372 246 personoj ricevis almena? unu dozon de unu el la kubaj vakcinaj kandidatoj kaj el ili, jam ricevis la duan dozon unu miliono 801 495 personoj kaj la trian dozon ricevis 940 185 personoj.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/261887-preskau-kvaronmiliono-da-kubanoj-estas-imunizitaj-per-almenau-unu-dozo-de-abdala-kaj-soberana-02

Radio Habana Cuba